

KIE

BRULAS,

ĜENTLEMANOJ ?

50
poemoj

de
Charles
BUKOWSKI



eldonis :
la broŝurservo
de S.A.T.

1989
20 FF

Cercle espérantiste de l'Agenais
F 47340 Laroque Timbaut

En ĉiuj ĉi jaroj, kiujn mi laboraĉis en buĉfabrikoj kaj benzinstacioj, antaŭ aŭtomataj ĉenbendoj kaj en subteraj fervojtuneloj, mia vorttrezoro ŝrumpis ĝis eta resto, sed per tiu ĉi resto mi provas elmarteli ĉion, kio enestas en mi.

Charles Bukowski

Charles Bukowski, naskita je la 16-a de aŭgusto 1920 en Andernach/Rhein. Elmigrado de la familio al Usono, kiam Bukowski havis du jarojn ; li plenkreskis en Los Angeles ; 1939/41 en la City College de Los Angeles ; poste en multaj diversaj laboroj kiel benzinvendisto, buĉisto, havenlaboristo, leterportisto kaj tiel plu kaj tiel plu, komencis verki, kiam li estis 35-jara, oni eldonis ĉirkaŭ 30 poemkolektojn, prozon kaj eseojn de li.

Kelkaj verkoj : "Notoj de randulo" (1970), "La fuĝsekura paradizo" (1973), "Poemoj, kiujn skribis iu, antaŭ ol li saltis el fenestro de oka etaĝo", "La viro kun la ledovalizo" (1974), "Kaputa en Hollywood - kaj aliaj rakontoj de la ĉiutaga frenezo" (1976), "Faktoto" (1977), "Western Avenue" (1979), "La amvivo de la hieno" (1980), "La plej terura ankoraŭ sekvas aŭ preskaŭ juneco" (1983), "Poemoj de l'suda fino de l' sofo" (1984), "Ne kun sesdek, kara" (1986).

La poemojn elektis kaj el la germana esperantigis

Hagen Hirte.

Mia patro

Li ĉiam portis pecon da karbo,
tranĉilklingon kaj vipon kun si,
kaj nokte li timis sian propran
kranion kaj kovris ĝin
per tukoj.

Iumatene neĝis
en Los Angeles,
kaj mi rigardis la neĝon,
kaj jen mi sciis, ke mia patro
pri nenio havas potencon;
kaj estinte iom pli granda,
mi fuĝis sur mia unua vartrajno
for de hejme,
mi sidis sur la kalksakoj,
kaj la kalko mordis ĝin
en mian konscion, ke mi
havas nenion,
kaj kiam mi eliris
en la dezerton
mi povis kanti
la unuan fojon.

Vegas

Jen staris frostmorta arbo,
kiun mi volis pentri, sed tiam
la grenadoj plugis la teron.
Kaj en Vegas mi sidis kun iu,
kiu havis verdan plastombrelon
super la okuloj,
kaj matene je la kvara
mi mortis surkruce, sen najloj,
sen ekzemplero de la "Atlantic Monthly",
la fenestroj kriis kiel kolomboj
post la aeratako kontraŭ Majlandon,
kaj ek mi devis, elen
al la ratoj, sed la lumoj tro helis,
kaj mi diris al mi : eble pli bonos,
se mi reiros al L.A., por kaŭri en
lirikseminario :
"Fabele bela priskribo de gazelo
estas la infero;
la kruco gluas kiel muŝo
sur mia fenestro,
la elspiroj de mia patrino
lasas susuri etajn foliojn
en mia cerbo."
Kaj mi veturis aŭtostope
reen al Los Angeles,
en nuboj, kun mizera kapo,
kaj mi eltiris leteron el poŝo
kaj legis ĝin, kaj la ŝarĝveturisto diris :
Kio estas tio?, kaj mi diris : Tio estas de
damo, kiu vivas norde kaj foje englitis la liton
kun Pound; ŝi provas komprenigi al mi,
ke Hilda Doolittle estas nia plej granda
poetino; nu jes, Hilda donis al ni iom da
porcelano kun rozeruĝaj grekaj dioj sur tio,
sed post kiam mi legis ŝian kaĉon,
ankoraŭ nun 140 glacistangoj plu pendas
de miaj ostoj.

Mi ne veturas ĝis L.A.,
diris la ŝarĝveturisto.
Faras nenion, mi diris.
"La Calla lilioj kapjesas al ni
enpense kaj unufoje venos la tago,
kiam ni ĉiuj kune iros hejmen."

Por diri pli precize, li diris,
ni veturos ĝis ĉi tie
kaj ne plu.
Sekve do mi ankoraŭ
eĉ kronis la tuton :
"Oldaj velkiĝintaj putinoj de l' tempo,
viaj manoj gustas
kiel la acida kremo de l' songoj..."
Li elĵetis min
mezen en la dezerton.

Oni mortas kaj mortas,
ĝis kiam oni estas morta.
Oldaj sondiskoj en keloj,
Joe Di Maggio,
fotogazetoj inter bulboj...
Olda Ford kunprenis min,
45 minutojn poste
kaj ĉifoje
mi fermtenis la buŝon.

Viro kaj virino enlite
je la deka vespere

Mi havas la senton, kvazaŭ mi estus
sardino en oleo, ŝi diris.
Mi havas la senton, kvazaŭ mi estus
el leŭkoplasto, mi diris.
Mi havas la senton, kvazaŭ mi estus
panaĵo kun tinuso, ŝi diris.
Mi havas la senton, kvazaŭ mi estus
striita tomato, mi diris.
Mi havas la sento, ke pluvos
ŝi diris.
Mi havas la senton, la horloĝo
haltis, mi diris.
Mi havas la senton, la pordo ne fermas,
ŝi diris.
Mi havas la senton, ke tuj elefanto
envenos, mi diris.
Mi havas la senton, ke ni devas pagi
la loĝejon, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke ni devus serĉi
laboron, mi diris.
Mi havas la senton, ke VI devus serĉi iun,
ŝi diris.
Mi havas la senton, ke mi ne volas,
mi diris.
Mi havas la senton, ke mi estas egala
al vi, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke ni fiku foje,
mi diris.
Mi havas la senton, ke ni faras tro ofte
tion, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke ni faru pli
ofte ĝin, mi diris.
Mi havas la senton, ke vi prefere serĉu
laboron, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke vi serĉu,
mi diris.

Mi havas la senton, ke mi bezonas ion
por trinki, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke mi bezonas
botelon kun viskio, mi diris.
Mi havas la senton, ke pli ol vino
ne eblos, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke vi pravas,
mi diris.
Mi havas la senton, ke mi rezignas
ŝi diris.
Mi havas la senton, ke mi bezonas
duŝon, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke vi brosu
mian dorson, mi diris.
Mi havas la senton, ke vi ne amas
min, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke mi tamen amas
vin, mi diris.
Mi havas la senton, via peniko nun
enestas min, ŝi diris.
Mi havas la senton, mia peniko vere
enestas vin, mi diris.
Mi havas la senton, ke nun mi amas vin,
ŝi diris.
Mi havas la senton, ke mi pli amas vin
ol vi mem, mi diris.
Mi havas la senton, ke tiel belas, ke
mi tuj devos krei, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke mi daŭrigus
plej prefere por ĉiam.
Mi havas la senton, vi vere
kapablas tion, ŝi diris.
Mi havas senton tian, mi diris.
Ankaŭ mi, ŝi diris.

La duŝo

Poste ni iras ĉiufoje sub la duŝon.
Mi ŝatas la akvon, se tre varmas,
ŝi ne tiom,
kaj ŝia vizaĝo ĉiam
tute molas kaj pacemas,
kaj ŝi lavas min ĉiam unue,
sapumas miajn ovojn, levas ilin,
premas ilin, tiam ŝi lavas mian penikon.
"Hej, ĝi ja eĉ nun plu rigidas!",
poste la tuta hararo jen malsupre,
la ventron, la dorson, la krurojn.
Poste mi lavas ŝin. Unue la muson.
Mi staras post ŝi, mian objekton
inter ŝiaj postpartoj
kaj ŝaŭmumas kun delikato ŝiajn
musoharojn, lavas ilin lante kaj senhaste,
mi bezonas por tio multe pli da tempo
ol nepre necesus...
tiam la genukavojn, la femurojn,
la postafon, la dorson,
mi turnas ŝin, donas kison al ŝi,
sapumas ŝiajn mamojn, la ventron, la kolon,
... la genuojn, la surojn, la piedojn...
tiam ankoraŭfoje la muson, pro fortuno,
ankoraŭfoje kison, poste ŝi eliras
kaj frotas ŝin, kelkfoje ŝi ankaŭ kantas
ĉe tio...

mi restas sub la duŝo, reguligas la akvon,
ĝis kiam pli varmas, ĝuas la agrablan senton,
la miraklon de l' amo. Tiam mi eliras,
kutime estas malfrue posttagmeze,
kaj ĉe la vestado ni pripensas kune,
kion ni ankoraŭ devas plenumi hodiaŭ,
sed per tio, ke ni kunestas, la plej multo
jam per si mem plenumiĝas, por diri la veron -
ĉio.

Kaj tiel longe, kiel tiel estas inter virino
kaj viro, por ĉiu estas foje pli bone, foje
pli malbone, sed ĉiam denove alie. Por mi
estas eksterordinare bela memoro, ĝi super-
daŭras la almarŝon de armeoj, la klikklakon
de ĉevalhufoj antaŭ la fenestro,
la postguston de malvenkoj, doloroj, deprimoj...

La predo

Feko, li diris
kaj tiris ĝin el la akvo,
kio tio estas ?
Hollow-Back June Whale, mi diris.

Ne, diris ulo, staranta
apud ni sur la kajo,
estas Billow-Wind Sand-Groper.

Alia alvenis kaj opiniis :
Estas Fandango-Escadrille sen strioj.

Ni forigis la fiŝhokon, kaj la aĵo
ekstaris kaj ellasis furzon. Ĝi estis
griza kaj harkovrita sur la tuta korpo,
kaj ĝi grasis kaj fetoris kiel oldaj
piedŝtrumpoj.

Ĝi komencis foriri de la kajo kaj ni
sekvis ĝin. De malgranda knabino
ĝi manĝis "Hot Dog"-on rekte el la mano.
Tiam ĝi saltis sur la karuselon kaj sidigis
sur "Pinto". Antaŭfine ĝi falis malsupren
kaj ruliĝis tra la segopulvoron.

Ni helpis ĝin leviĝi.

Grop, ĝi diris, grop.

Tiam ĝi reiris al la kajo
antaŭen, ni postiris, granda
homamaso sekvis nin.

Varbogago, iu opiniis,
estas viro en skafandro.

Ĝi komencis spiri forte. Tiam
ĝi falis dorsen kaj
ekspasmis.

Iu verŝis bieron
sur ĝian kapon.

Tiam ĝi mortis.

Ni rulis ĝin al la fino de la kajo
kaj puŝis ĝin reen en la maron.
Ni rigardis ĝian enakviĝon
kaj malaperon.

Estis Hollow-Back June Whale,
mi diris.

Ne, diris alia,, estis
Billow-Wind Sand-Groper.

Ne, diris la tria eksperto,
estis Fandango-Escadrille
sen strioj.

Tiam ni disiĝis, kaj ĉiu ree
iris sian propran vojon.
Estis malfrua posttagmezo
en Aŭgusto.

La momento de l' vero

Li mortigis sin en dormdomo
en la mizerkvartalo de Detroit,
kaj kiam oni trovis lin, li jam rigidis.
Ratveneno.

Mi estis tiam la manĝero de tiu budo,
mi elŝutis la paperkorbojn
kaj provis enkasigi la monon.

Mi staris apud li kaj observis,
kiel ili pafis injekton en lin,
liaj okuloj vaste apertis, kaj unu el ili
superviŝis mane ilin kaj fermis la okulojn,
kaj tiam la injekto ekis efiki -
li mortis sidante, kaŭris rigide sur sia seĝo -
kaj nun li lante kunfalis.

Ili trovis kelkajn leterojn de lia fratino
el alia urbo, ĵetis lin sur la brankardon
kaj portis lin ŝtupare malsupren.

La littuko ankoraŭ sufiĉe puris,
tiam mi simple glatskuis ĝin,
poste malplenigis la komodon, kaj kiam mi elvenis,
ĉiuj ĉi drinkuloj staris sur la koridoro,
en pantalonoj kaj kotaj subvestoj,
kun stoplobarboj kaj sekaj langoj, kaj mi diris :
"All right, vi simioj, rapidu, ke vi foriĝu de ĉi tie !
Ĉe via aspekto miaj okuloj doloras!"

"Jen viro mortis, Sir, estis amiko de ni."

Estis Benny the Dip. "All right, Benny",
mi diris, "mi donas al vi ankoraŭ unu nokton!
Se vi ne pagos ĝis tiam la ĉambron, mi elĵetos vin
el ĉi tie!"

Tion vi devintus vidi, kiel ili for-sagis.

Pri la morto neniu cerbumas, se li nescias
kie dormi morgaŭ.

La prizonaĉo de Moyamensing

En la tagmeza paŭzo ni pokeris, per ĵetkuboj ktp., en angulo de la prizona korto. La aliaj ludis basketbalon per olda kunnodita ĉemizo.

Foje kaj foje interrompis nin palvizaĝa polipo enture, kiu direktis sian pafilon al ni.

Sed iel ni sukcesis ĉiutage fari kelkajn ludojn, kaj kun iom da feliĉo kaj per bona mano mi baldaŭ forprenis de la tuta bloko la mamonon.

Kaj matene kaj en la tagoj postaj okazis io stranga :

la fermulo, la pisuloj, la tranĉilherooj, la monŝrankspecialistoj, la batistoj, la frenezuloj, la Freaks, la deseligitaj songoprezidantoj de Usono, la kuiristo, eĉ miaj malamikoj - ĉiuj alparolis min "Mr. Bukowski". Estis ia speco de senmorteco, nura aludo de ĝi,

sed tiel reala kiel porkokapo kun galantino, aŭ mortaj floroj;

kaj mi komencis flari,

kion signifas ĉi tio -

Mr. Bukowski, la pokerĵokero,

la viro kun la monsako,

en mondo, kie fakte neniu havis

ion...

Senmorteco.

Kaj mi ne devis deklami la poeton Shelley por ili

- ĉio flugis kvazaŭ per si mem al mi :

knaboj kun sveltaj koksoj, kiujn mi povis uzi neniel,

kaj stekoj kaj Ice Cream kaj cigaroj, kiujn mi tut-

certe povis uzi, kaj

razosapo, novaj razoklingoj, la lasta eldono de la

NEW YORKER.

Senmorteco. Strio da ĉielo en la infero.

Kaj mi ĝuis ĝin, ĝis kiam ili denove elpelis min

sur la straton,

reen al mia skribmaŝino -

senkulpa, pigra, tremante pro timo

kaj tre morteca.

Al la putino, kiu ŝtelis miajn poemojn

Kelkaj opinias, ke ni ellasu
nian privatan kaĉon
for el niaj poemoj,
ke ni restu abstraktaj,
kaj por tio troviĝus vere bonaj kialoj,
sed fulmotondro, dek du poemoj for,
kaj mi neniam kopias ilin,
miajn bildojn vi same enpoŝigis,
eĉ miajn plej bonajn, estas
katastrofo, ĉu vi volas frakasi min,
tiel, kiel ĉiujn aliajn ?
Kial vi ne prenis mian monon ?
La flirtinoj preskaŭ ĉiam
elfingrumas ĝin
el miaj pantalonoj,
kiuj malsane kaj ebrie
dormas angule.
Venontan fojon prenu mian dekstran brakon
aŭ kvindekon,
sed ne miajn poemojn !
Mi ja ne estas Shakespeare, estas vere,
se fojfoje simple nenio postkreskas,
abstrakte aŭ kiel ajn.
Mono ĉiam ekzistos, kaj putinoj kaj drinkuloj,
ĝis la lasta bombo falos,
sed kiel dio diris tiam
post farita laboro :
Mi vidas, ke mi kreis
amason da poetoj,
sed ne tro da arto.

Maŝinpafiloj, gardoturoj kaj kontrolhorloĝoj

Mi sentas min mistifita de stultuloj,
kvazaŭ la realo estus la propraĵo de
etspritaĵoj kun
feliĉo kaj startavantago,
kaj mi sidas en la frido
kaj pensas pri violaj floroj
ĉe latbarilo ;
dume ĉiuj aliaj amasigas oron
kaj Cadillac-ojn kaj
amikinojn,
mi pensas pri palmfolioj
kaj tombŝtonoj
kaj la altvalora donaco
povi dormi
kiel en kokono ;
esti lacerto
estus sufiĉe fia,
sed ne tiom fia
kiel esti trudata
je virostature kaj
virovivo kaj ne ŝati
la tristan ludon :
maŝinpafilojn kaj gardoturojn
kaj kontrolhorloĝojn,
aŭtolavado,
lasi tiri denton al si,
brakhorloĝojn, manikbutonojn,
radioaparatojn,
pinĉiletojn kaj vaton,
hejmapotekon plenan de jodo,
koktelrondojn

viroĥorojn,
novajn ŝuojn, kristnaskdonacojn,
vivasekurojn,
162 baseballudojn,
forpermeson sur la Bermudas -
nenion, nenion ŝati el ĉio ĉi.
Kaj mi diras al mi, la violaj floroj
pli bonŝancas ol mi,
la lacerto pli bonŝancas,
la morneverda ĝardenhoso,
la ĉioeltena herbo,
la arboj, la birdoj,
la kato songanta
en la buterflava suno,
ĉiuj ĉi pli bonŝancas ol mi,
kiu nun surmetas elmodan mantelon,
serĉas cigaredojn,
la aŭtoŝlosilojn,
stratmapon por la vojo
reen.

Mi eliras
sur la enveturvojo maisupren,
kiel al ekzekuto,
mi alpaŝas ĝin,
senhezite,
eniras
sen iu eskorto,
alveturas ĝin,
sage alrapidis ĝin
kun 110 horkilometroj
sur la elĵetsidilo,
mi sakras, lasas fali cigaredcindron,
ĉirkaŭblovate
de la mortiga cindro
de ĉiuj mortigaj brulantaj
aĵoj,
la raŭpoj malpli da hororoj konas,
la formikarmeoj
estas pli kuraĝaj,

la kiso de serpento
ne tiom bestecas kaj sovaĝas,
mi jam nur volas,
ke la ĉielo ardigu min
ĝis elbrulo,
ke la suno je la sesa matene leviĝu
kaj supre restu ĝis noktomeze,
mi alveturas ĝin,
kvazaŭ ĝi estus la dompordo
de ebriulo,
kiu ĉiam apertas,
mi ne volas ĝin,
sed mi ricevas ĝin,
ĝi eniras min,
dum la kato etendiĝas,
oscedas
kaj alrevas
novan sonĝon.

Faboj kun ajlo

Estas jam grave, ke vi skribas pri tio,
kiel vi sentas vin,
estas pli bone ol se vi
razas vin aŭ kuiras fabojn
kun ajlo. Estas la malmulto,
kion ni povas fari,
ĉi tiu eta kuraĝo klarigi
pri ni mem, kaj nature
ankaŭ frenezo kaj timo
enestas en tiu scio,
ke parto de vi
estas horloĝmekanismo, kiu iam
haltos kaj ne plu restreĉeblos.
Sed nun
ĝi ankoraŭ tiktakas sub via ĉemizo,
kaj vi kirlas la fabojn
per kulero...
amatino mortas, alia for,
alia...
aĥ ! tiom da amatinoj kiom da faboj,
ja, foje nombro ilin -
malĝoje, malĝoje
kiel viaj sentoj
forbrulas sur la fornelo.
Skribu pri tio.

Anonco en la Philadelphia Inquirer

Estis en Philly, kaj la koktelisto
diris : Kiun deziron ? Kaj mi diris :
Glason elbarele, Jim, devas levi miajn
nervojn, mi iros pro laboro.

Vi ? li diris. Laboron ?

Yeah, Jim. Mi vidis en gazeto.

Antaŭscioj ne necesas.

Mil diabloj, li diris, vi ja ne volas
laboron.

Kaj mi diris : Mil diabloj, nee,
sed mi bezonas monon.

Mi eltrinkis mian bieron kaj grimpis
en la buson, rigardis la domnumerojn,
baldaŭ mi proksimiĝis la ĝustan numeron
kaj tiam mi alvenis, mi tiris la ŝnuron,
la buso haltis, kaj mi eliris.

Estis granda konstruaĵo el ondolado,
la ŝovpordo firme enestis en koto.

Mi ŝovis flanken ĝin kaj eniris.

Ne estis planko, nur pli da koto,
mola kaj malseka, fetoris, kaj oni
aŭdis bruojn, kvazaŭ oni meze trasegas
ion kaj kvazaŭ oni boras truojn ie,
estis morne, viroj super mi iris sur
fertraboj, viroj ŝovis vagonojn tra
la halo, viroj sidis ĉe maŝinoj kaj
faris ion, kaj fulmoj fulmis kaj ton-
dro krakis kaj subite alŝvebis barelo
plena de flamoj, rekte al mia kapo,

muĝis kaj bolis en la barelo, ĝi
pendis libere ŝvebante je ĉeno kaj
venis rekte al mi, kaj iu kriis HEJ
ATENTU ! Mi korpklinis ankoraŭ su-
fiĉe frue sub ĝin, mi sentis kiel
ĝi superflugis varmege min kaj iu
demandis : KION VI VOLAS ? Kaj mi
diris : KIE ESTAS ĈI TIE LA FEK'-
BUDO ?

Oni diris ĝin al mi
kaj mi eniris.

Revenante, mi vidis iliajn korpojn,
kiuj fantome moviĝis tra flamoj kaj
muĝaj bruoj, mi iris al la pordo kaj
tiam mi eksteris kaj veturis reen al
la koktelejo, sidiĝis kaj mendis denove
elbarele, kaj Jim demandis : Kio estis ?
Mi diris : Ili ne akceptis min. Tiam
envenis tiu putino kaj sidiĝis ĉe
tablo, kaj ĉiuj rigardis transen al ŝi,
ŝi aspektis bone, kaj mi rememoras,
ke estis la unua fojo en mia vivo, ke
preskaŭ mi deziris havi museton kaj
klitoron anstataŭ tio, kion mi havas,
sed post du aŭ tri tagoj mi transvenis
tion kaj legis denove la laborofertojn.

Laboristoj

Ili ĉiam ridas pri io,
ili eĉ tiam plu ridas,
se trabo falas malsupren
kaj frakasas vizaĝon
aŭ kripligas korpon ;
eĉ se la okuloj
en la morna lumo danĝere
paliĝas, ili plu ridas,
sulke kaj eluzite, tro frue
oldiĝinte - ili faras eĉ el tio
ŝercon. Viro aspektanta sesdekjara
diras al vi,
ke li havas 32 jarojn, kaj poste
ili ĉiuj ridas.
Fojfoje oni ellasas
eksteren ilin, en la freŝan aeron,
sed ili estas katenitaj
per ĉenoj nedisŝireblaj de ili,
eĉ se ili kapablu tion ;
kaj ankaŭ ekstere, inter
homoj pli liberaj, ili ridas plu,
ili vagas kun sia kruda
senfantazia maniero
kvazaŭ ili perdis
la menson ; jen ekstere
ili maĉas pecon da pano,
kverelas,
dormas, kalkulas
sian monon, gapas la horloĝon,
kaj reiras. Fojfoje
ili seriozas dum momento
en sia prizono,
ili ridas pri "ekstere",

pri tio kiel terure
devas esti resti "ekstere"
por ĉiam, -neniam denove
enlasataj.
Estas varme ĉe la laboro,
ili ŝvitas iom,
sed ili streĉe laboras
kaj bone, ili tiel streĉe laboras,
ke iliaj nervoj kolapsas,
ke tremoj ekskuas iliajn ostojn,
kaj plej ofte ili estas laŭdataj
kaj pelataj de tiuj,
kiuj levigis kiel steloj
el iliaj vicoj
kaj nun gardas pri ili :
Tiuj kontrolas tiujn,
kiuj povus provi
lantigi la laborrapidon
aŭ ne emas labori
aŭ ŝajnigas malsanaj sin
por povi ripozi iom
(ripozon oni devas "perlabori"
al si, kaj ĝi estas cetere
nur por tio, ke oni kolektas
novajn fortojn
por eĉ pli grandaj laborkvantoj.)

Fojfoje iu mortas
aŭ freneziĝas, kaj tiukaze
venas novulo el "ekstere"
kaj uzas sian bonŝancon.
Mi mem jam de jaroj
ĉeestas tion. Unue
mi trovis monotona kaj idiota
la laboron, sed nun
mi vidas, ke ĉio
havas signifon,
ke la kolegoj, preskaŭ ne plu havantaj
vizaĝojn, ne vere fivizaĝas,
ke la okuloj ŝajne vakaj

povas vidi kaj
kapablas fari sian laboron.
La laboristinoj ofte
eĉ pli bonas, ili
lernas rapide, kaj
kelkajn el ili
mi jam fikis en la paŭzoj.
Unue mi trovis parolpupoj ilin,
sed pli poste, kiam mi ilin pli bone,
klariĝis al mi, ke ili
tute tiel realis kaj vivoplenis
kiel mi mem.

Antaŭ kelkaj tagoj
olda laboristo
grizharara, duone blinda,
ne plu uzebla,
estis enpeniigita
al "ekstere".

Paroladon ! Paroladon !
ni kriis.
Estis la infero,
li diris.

Ni ĉiuj ridis,
ĉiuj 4000 laboristoj :

Li ne perdis
sian humuron
ĝis la
fino.

La fino de Seivers

Seivers estis unu el la plej akraj defendantoj ekde Jimmy Brown kaj havis svingon en la koksoj kiel nudodancistino, ĝis kiam ĵutage Basil Skronski surkornigis lin. Ni elportis Seivers el la lud-kampo, sed ankaŭ Skronski rompis du aŭ tri ripojn al si.

En la sekva jaro Seivers ne tro brilis, eĉ ne dum la trejnoj, li klakis la dentojn pro timo, li ne vere atakis, fuŝadis iele-iome, ne povis teni la balon kaj ne gajnis eĉ metron ; kvankam foje li kuris la cent metrojn en dek-du.

Mi estas kvardekkvinjara, ne plu atleta, tra da biero, sed la plej bona trejnisto en la Professional Football. Kaj se mi eĉ ne povas flari ion, jen tion, ulon, kiu perdas energion. Mi prenis albruste Seivers en la vestŝanĝejo. La tuta teamo ĉestaris. "Seivers", mi diris, "iam vi estis Football-ludisto. Nun vi jam estas nur malkuraĝa rato!"

"Tiel vi ne rajtas paroli al mi, Manny!" li diris. Mi turnis lin, li ĝuste surtiris la botojn, kaj svingis dekstran hokon je lia mentono. Li falis kontraŭ sian ŝrankon. Kaj tiam li eklarmis. La plej granda ekde Brown, kaj jen li kuŝis antaŭ sia ŝranko kun unu boto kaj larmis.

"Ek, viroj, eksteren en la sekvan rondon!" mi diris, kaj ni elkuris, kaj kiam ni revenis, li forestis, lia ŝranko vakis. Ni prizorgis novan defendanton al ni, junulon el Illinois, tiu prenas la kapon inter la ŝultrojn, la genuojn alten, la okulojn fermas kaj atakas - al li ĉio estas tutegala.

Uloj kiel Seivers finas sian karieron kiel telerpurigistoj por dolaro hore kaj ion pli bonan ili efektive ne meritas.

La tretkaruselo

Vere, al la plej teruraj aferoj
apartenas, nokton post nokto
kuŝi en lito
kun virino
ne plu fikebla.

Ili iĝas oldaj, ne plu aspektas bonaj,
jam eĉ komencas ronki, kaj perdas
sian temperamenton.

Jen vi do kuŝas en lito
kaj kelkfoje vi turnas vin
kaj tuŝas ĉe tio ŝian piedon -
dio mia, terure! -
kaj la nokto estas tie ekstere
post la kurtenoj
kaj baras vin kune
en via tombo.

Kaj sekvamaten, se vi ambaŭ
iras en la banĉambron, vi iras
en la koridoro unu preter la alian,
ambaŭ vi parolas ion,
ambaŭ vi diras malgravajn vortojn.
Ovoj rostiĝas. Motoroj ekas.

Sed ĉe la matenmanĝotablo
du fremduloj sidas kune,
ŝovas toaston en la buŝon
kaj verŝas tre varman kafon
en la ventron.

En dek milionoj da loĝejoj en Usono
estas same -
elsuĉitaj vivestaĵoj,
apogante sin, unu kontraŭ la alia,
sen iu ŝanco.

Vi eniras la aŭton,
veturas al la laboro,
kaj tie denove fremduloj estas ;
la plej multaj same ligitaj kiel paro kun iu
kaj en la tretkaruselo sub la gilotino
ankoraŭ trovas tempon flirti kun aliaj,
pinĉas reciproke la postaĵojn, ĉeokaze foje
ie entreprenas starfikon -
hejme ne eblus -
kaj poste denove la veturo hejmen,
la atendado je kristnasko, je la unua de majo,
je dimanĉo
aŭ je kio ajn.

Amo

Amon ? li diris - gason
kisu min lastafoje
kisu miajn lipojn
kisu mian hararon
miajn fingrojn
miajn okulojn mian menson
por ke mi povu forgesi

Amon ? li diris - gason...

Li havis ĉambron en la tria etaĝo
misŝancis ĉe dekduo da virinoj
ĉe 35 gazetoj kaj
ĉe duona dekduo da laborperadoj
Sed tio tute ne signifas, ke li
estis nekonata geniulo
Li malfermturnis ĉiujn gaskranojn
kaj kuŝigis sin sur la liton

Kelkajn horojn poste
iu bruligis
sur la vojo al la ĉambro 309
cigaredon

La sofo flugis el la fenestro
vando kunfalis en si mem
kiel malseka sablo
Kaj ruĝa eksplodflamo
pafiĝis ducent metrojn
en la aeron

Al la ulo en la lito
tio ne plu faris dolorojn
estis egale al li

Sed mi dirus
en tiu ĉi tago
li estis enorme bona.

Ruĝa kaj ora koloro

Do

mi havas
ruĝan koloron

kaj

oran koloron

kaj ne estas multe por fari
matene je la tria kaj kvardek
pentri

kaj trinki

kaj prefere lasi kelkajn
ideojn

tre proksimajn.

Jen mi memoras

ke hieraŭ mi notskribis
ion en la fabriko
kaj enpoŝigis ĝin.

Mi iras al mia ŝranko
serĉas en mia pantalonpoŝo
kaj trovas

pecon da papero

sur kiu mi legas :

"Kontraŭ iliaj fiaj trukoj
vi bonŝancas nur kun feliĉo
kaj ĝenerale ili ĉiam surprizas
vin per novaj trukoj."

Tio ŝajnas tre senkuraĝiga.
En la gazetoj krome oni skribas,
ke ducent viroj en Vjetnamo
mortis por la patrio kaj,
ke morgaŭ eble pluvos.

Mi havas ĉi tie ruĝan kaj
oran koloron
sed kiel Shakespeare jam diris :
Estas

preskaŭ ĉiam

la eterna kirlado

en la olda feko.

Hemoroidoj-Blues

Jen mi kuŝas plate sur la ventro, Hem mortas,
Shake mortas, la fiŝoj, kiujn mi kaptis
manĝis kaj eligis, mortas,
la Doc ramas vitrotubon en mian postaĉon,
ĝi havas antaŭe lampeton, kaj mi suferas
postdrinke kaj bezonas kuracistan ateston,
kiu klarigas al Uncle Sam, kial mi preter-
lasis labori du tagojn, kaj la Doc tuj trovas
la laŭan sintenon : "Hm, tio ja vere aĉe aspektas,
tujn ni devos eltranĉi verŝajne..."

"Nu jes, la blankrusoj, se mi memoras bone,
malfermtranĉis la ventron de viro, kaptis
intestopecon al si kaj najlis ĝin al arbo,
kaj la viro devis kuri tiom longe ĉirkaŭ
la arbon, ĝis kiam liaj tripoj alkroĉis sin
kiel arĝentfadenoj je kristarbo..."

Li eltiras la vitrotubon el mia postaĉo, kune
kun peco de mi, li havas vizaĝon kiel juglando,
kaj se lia asistino kliniĝas super la steri-
lizatoron (kaj tion ŝi faras ofte) ŝia pugo
aspektas kiel granda mola kapkuseno aŭ Doughnut
kun pudorsukero, sensanga kiel blanka somernubo,
kaj mi diras : "Doc, ankoraŭfoje alkroĉu tagon,
mi sentas la doloron ĝis en la ovojn." "Klare",
li diras, "mi konas multajn ulojn de la poŝtoficejo,
estas ĉiuj fajnaj kamaradoj..."

Hejme mi forŝraŭbas la fermilon de la botelo
kaj akceptas al mi la unuan profundan gluton.
Pluvis, dum li kuracadis je mi, la pluvgutoj,

grasaj de stroncio 90, sidas en la etaj truoj
de la muŝrado kiel fruktmuŝoj, kiuj forpaŝtas
niajn sonĝojn. Mi dissplitas la Turf-gazeton
per mia dikfingro kaj telefonas Whitechapel :
"Donu al mi du transbeden por Indiana Blood,
kvin venkojn por Lady Fanfare, kvinan lokon por The Rage..."

Mi demetas kaj pensas kunsente pri Kafka, kiun
nokte la didelfoj kuris super la haŭton,
la damo sur la alia flanko de la koridoro
antaŭkantas ion por sia kanario, oni ek- kaj
deŝaltis ŝian amon kiel gasfajrilon aŭ la
lumon en la fekejo, birdo nun ŝia lasta amo
estas... Tiel iros kun ĉiu el ni, kiam ne
multe okazos plu, kaj se oni devos ludi sur
pli malgranda scenejo. Mi pinglas la paper-
ĉifonon de la Doc vanden, al unu el miaj oldaj
bildoj, ŝmiras iom de la unĝvento poste
en min kaj enverŝas plian glason por mi.

Fuĝo antaŭen

Ĉe la latbarilo apud la glaciejo kuŝis sola tabulo, mi prenis ĝin kaj komencis fosi, la tero molis kaj plenis de vermoj, baldaŭ mi enstaris ĝis la koksoj, scivolemaj kolektiĝis kaj retro-evitis pro la argilaj buloj elĵetataj de mi, kaj kiam la polico alvenis, mia kapo jam malaperis en la tertruo, etaj poŝratoj fuĝis pro mi, mi vekis terurige angilojn el la vintro-dormo, mi entagigis pecojn de kranioj kun oraj inkrustoj. Kaj ili demandis min : "Kion vi serĉas tie ? Nafto-fonton ? Trezoron ? Ĉu vi volas tra-igi Ĉinion ? Ĉu vi eble perdis vian ŝlosilon ?"

Knabinetoj gapis super la randon de la fosaĵo, iliaj glaciaĵoj gutis sur min malsupren en la mornon, psikiatro venis, kaj College-profesoro, film-aktorino en bikino, rusa spiono kaj franca spiono kaj unu el la brita sekretservo, teatrokritikisto, ekzekuciisto kaj eksa amikino de mi, kaj ĉiuj volis scii, kion mi serĉas tie. Komencis pluvi, atomosub-marŝipoj ŝanĝis la kurson, Tuesday Weld kaŝkauris sub gazeto, Jean Paul Sartre turnis-turnis sin maltrankvile endorme,

kaj mia truo pleniĝis de akvo. Mi el-
grimpis, nigra kiel Afriko, disŝprucigis stelojn
falantajn kaj tombosurskribojn, miaj poŝoj
plenis de tervermoj, kaj ili kondukis min
en sian prizanon, ili ordonis duŝon kaj iun
el siaj plej bonaj unupersonĉeloj senkostaj
por mi, kaj ekstere ili eĉ nun plu staras
kun afiŝoj kaj sloganoj kaj manifestas
proteston por mi, mi havas kontraktojn
por televidintervjuoj, por libro kaj gast-
kolumno en la loka gazeto, mi varbu por ne
malmultaj produktoj, mi havas sufiĉe da
mono, por povi loĝi dum jaroj en la
plej bonaj hoteloj, sed tuj, se mi el-
venos el ĉi tie, mi prenos plian tabulon
kaj ree fosos kaj fosos kaj fosos, kaj
ĉifoje mi ne haltos, ĉu pro la suno aŭ
la pluvo aŭ bikino. La reporteraj plu
truas min per demandoj - Kial vi faris
ĝin ? Kio estas post tio ?
Sed ĉio, kion ili ricevas de mi, estas
kvieta rideto, dum mi donas fajron al
mia cigaredo.

Dormanta virino

Estas nokte, mi sidas en la lito kaj aŭskultas vian ronkadon. Ni renkontis nin en busstacidomo kaj nun mi admiras vian dorson, la palan haŭton kovritan de lentugoj, dum la lumo formetas la nesolveblan suferon de l'mondo sur vian dorson. Viajn piedojn mi ne povas vidi, sed mi imagas, ke estas tre ĉarmaj piedoj. Al kiu vi apartenas ? Ĉu vi vere ekzistas ? Mi pensas pri floroj, pri bestoj, ili ŝajnas neatingeble bonaj al mi, tiel klare kaj reale. Vi ne kulpas, ke vi estas io alia. Ĉiu estas destinita por io. La araneo, la kuiristo, la elefanto. Estas, kvazaŭ ĉiu el ni estus bildo sur vando de galerio.

Kaj nun turniĝas la bildo sur la dorso, kaj malantaŭ la kurbigita kubuto mi vidas duonan buŝon, okulon kaj parton de la nazo. Ĉio alia restas kaŝita, sed mi scias, ke vi estas nuntempa, moderna, vivanta artaĵo, eble ne senmorta, sed ni amis nin.

Ronku plu,
mi petas.

Por ino, kiun mi konis

De ĉiuj ĉi feraj litoj en la paradizo
la via estis la plej frida
kaj mi estis fumo en via spegulo
kaj vi lavis vian hararon per "Jade"
vi estis virino kaj mi
knabo, sed ne tro juna
por via fera lito
kaj sufiĉe olda por la vino
kaj por vi
Nun mi estas viro
sufiĉe olda por ĉio,
kaj vi
multe pli olda
ne plu tiel
sensentas, sed via
ferlito
estas nun
vaka.

Ja ne montru vin ĉi tie

Yeah, klare, mi estos hejme,
se mi ne estos ie aliloke ;
ne frapu, se ne lumas
aŭ se vi aŭdas voĉojn ; ankaŭ povas
esti, ke mi ĝuste legas Proust, se
iu traŝovas Proust sub la pordon
aŭ oston de li, por mia legomsupo ;
kaj mi povas pruntedoni nek monon
nek mian aŭton, aŭ kio ankoraŭ post-
restis de mono aŭ aŭto, kaj ankaŭ
telefoni vi ne povas ĉi tie ;
la gazeton de hieraŭ vi povas ricevi,
oldan ĉemizon aŭ Bologna-Sandwich-on
aŭ dormi sur la sofo
se vi ne krias nokte,
kaj ankaŭ paroli vi povas, pri vi,
tio tute normalas ;
estas streĉaj tempoj por ĉiu el ni,
kvankam mi ne provas
fondi familion
kaj ne lasas studi miajn filojn en Harvard
aŭ aĉetas ĉasdistrikton ;
mi ne volas fari grandan karieron,
mi provas nur, ankoraŭ dum iom da tempo
trabarakti min tra la vivo ;
tial, se vi frapas ĉeokaze,
kaj mi ne malfermas,
kaj ankaŭ virino ne estas ĉi tie,
jen mi eble havas rompitan makzelon
kaj ĝuste serĉas pro dratpeco,
aŭ mi ĉasas
la papillojn sur mia tapeto ;
mi opinias, se mi ne malfermos,

jen mi simple ne malfermos ; kaj tio estas,
mi ankoraŭ ne atingis la punkton,
ke mi volas murdi vin aŭ ami
aŭ eĉ nur akcepti ;
tio estas : mi ne volas paroli,
mi estas okupita, mi frenezas, mi ĝojas,
aŭ eble mi ĝuste alfiksis ŝnuron
je la plafono ;
do : ankaŭ se lumas
kaj vi aŭdas ion, ion tian kiel
spirojn aŭ preĝadon aŭ kantadon,
la radioaparaton
aŭ rulatajn ĵetkubojn
aŭ tajpadon - foriru,
ne estas la tago, ne la nokto, ne la horo ;
ne estas la sengentileco de iu,
kiu ne scias pli bone tion,
mi ne volas kaŭzi doloron al iu,
eĉ ne al cimo ; estas nur tiel,
ke mi kelkfoje ekkomprenas ion,
kion mi devas ordigi unue,

kaj viaj bluaj okuloj, se ili bluas,
kaj via hararo, se vi havas iun,
aŭ viaj pensoj - ili ne rajtas enveni ĉi tie,
ĝis kiam la ŝnuro estas aŭ fiksita
aŭ detranĉita, aŭ ĝis kiam
mi razis min
antaŭ novaj speguloj,
ĝis kiam la mondo
estas aŭ haltigata
aŭ eksplodigata
por ĉiam.

Buffalo Bill

Ĉiŭfoje, se la domadministranto kaj lia oldino
plenverŝas per bieroj sin,
ŝi venas malsupren kaj frapas mian pordon
kaj mi kuniras kaj trinkas bierojn kun ili.
Ili kantas oldajn melodiojn kaj
li trinkas kaj trinkas
ĝis kiam li retrofalas de la seĝo ;
tiam mi ekstaras
remetas la seĝon
kaj tiam li sidas denove ĉe la tablo
kaj kaptas konservobieron
al si.

Iam la interparolado ĉiam direktiĝas
al Buffalo Bill, ili trovas tre komika
Buffalo Billon. Tial mi ĉiam demandas :
"Io nova pri Buffalo Bill ?"

"Ho, li enĉelas denove. Ili pinĉis lin.
Ili venis kaj foriris kun li."

"Kial ?"

"La olda afero. Nur, ke ĉiŭfoje estis
atestantino de Jehovo. Ŝi sonorilis
ĉe li, jen staris, kaj babiladis al li
kaj li montris al ŝi sian objekton,
nu, vi ja scias.

Ŝi venis ĉi tien al ni kaj rakontis ĝin
kaj mi diris al ŝi, "Ja kion vi volas
de tiu viro ? Kial vi sonorilis ĉe li ?
Li ja tute ne faris ion kun vi !"
Sed ne, ŝi devis kuri al la polipoj
kaj fajfi ĝin.

Li telefonis min el la aresto. "Well, mi faris jam denove !" "Kial vi propre faras tiel ofte ?" mi demandis. "Kiel mi sciu ?", li diris, "mi tute ne scias, kial mi faras tion !" "Estus vere pli bone, se vi ne farus", mi diris al li. "Mi scias, ke estus pli bone, se mi ne farus", diris li.

"Nu, kiel ofte li do faris ĝis nun ?"

"Ho dio, kiel mi sciu, ok- aŭ dekfoje. Li faras ĉiam denove, sed havas bonan advokaton, absolute bonan advokaton."

"Kaj al kiu vi nun luigis lian budon ?"

"Ho, ni ne luigis lian budon. Ni ĉiam tenas libera lian budon. Ni ŝatas lin. Ĉu mi jam parolis al vi pri la nokto, kiam li ebriis kaj ekster sur la gazono zigzakis, absolute nuda, kaj aviadilo transflugis super nin, kaj li montris sur la lumojn, oni vidis nur la postajn lampetojn kaj tiajn aĵojn, kaj li montris al la lumoj kaj kriegis : "MI ESTAS DIO ! MI METIS LA LUMOJN TIEN EN LA ĈIELON !"..."

"Nee, pri tio vi diris nenion ion ĝis nun."

"Trinku bieron por la unua, tiam mi rakontos al vi."

Mi trinkis por la unua bieron.

El papilio oni ne povas fari leonon

Li havis altan staturon
kaj fortis
li simple estis naskita por tio
kune kun siaj enormaj bukloj
kiuj falis sur sian frunton
li havis eĉ britan akĉenton
kaj li beletis, se oni ne tro
precize rigardis lin
ĉio, kio mankis al li, estis la
preteco batali kaj temperamento
li neniam malsatis
li neniam solecis
li neniam io alia estis
krom granda muskolmaŝino
kun enormaj bukloj
kaj ni puŝis lin antaŭen
en la superpeza klaso
kontraŭ pordraŝaj knaboj
kun vitraj makzeloj
kaj post 26 bataloj li ne
perdis iun, kiam mi sendis lin
en la ringon kontraŭ la kvinan
el la rangolisto
nigran dikventrulon
kiu kokainis
kaj jam dufoje sidis prizone
unufoje pro seksperforto
unufoje pro rompŝtelo
kaj nia Bobby
plaĉis
en la unua rondo
kontraŭ la dikventra
li avantaĝis je 15 centimetroj
en la pugnodistanco
li havis junecon

grandan korpon
forton
korpe li estis perfekte trejnita
sed en la dua rondo
la graskorpa venis
el la angulo kaj komencis
trafi la celon
el la distanco
kaj nia knabo evitis
kiel knabineto
premiĝis inter la ŝnurojn
kaŝis sin post siaj brakoj
kaj en la tria estis la sama
kaj en la kvara la dikventra
trapuŝis
al lia mentono
kaj nia Bobby tuj kuŝiĝis
teren
lasis elkalkuli sin
kaj ekstaris nur ĉe 11.

Neniu el ni parolis vorton al li
en la vestoĉambro.
Li sidis sur la tabloeĝo
kaj diris : "Mi pensas,
ke mi iros en aktorolernejon."
La graskorpa tuj post la batalo
estis dirinta al mi :
" Tiu tipo eĉ en bordelo
unuaklasa ne povus levi
la lancon."

"Iru kaj duŝu vin, Bobby",
iu en la ĉambro diris.

Kiam li iris sub la duŝon
ni rigardis nin, ni estis
tri aŭ kvar.

"Nu jes, feko", iu diris.
Kaj ĝuste tio estis.

Eniro libera

La belulino tie
sur la ĉeftribuno
kun sia ruĝe kolorita hararo
frotis daŭre siajn mampintojn je mi
kaj parolis pri pokersalonoj
en Gardena
sed mi blovis la cigarofumon
sur ŝian vizaĝon
kaj rakontis al ŝi pri Van-Gogh-
ekspozicio,
kiun mi vidis supre ĉe la monto,
kaj kiam mi kondukis ŝin tiuvespere
hejmen al mi,
ŝi diris,
ke tian unuaklasan ĉevalon kiel Big Red
ŝi neniam vidis ĝis nun -
ĝis kiam ŝi vidis nuda min. La
diferenco estas nur en tio, ke ili
postulis por Van Gogh, mi supozas,
po 50 cendojn por eniro.

Letero el granda foro

Ŝi skribis leteron al mi
el malgranda ĉambro
proksime de la Seine.

Ŝi skribis, ke ŝi frekventas
baletkurson. Ŝi ellitiĝas,
ŝi rimarkis, je la kvina matene,
kaj skribas poemojn
aŭ pentras,
kaj se ŝi sentas
la emon por plori,
jen ŝi havas por tio
specialan benkon
malsupre de l'
rivero.

Iliajn kantojn, ŝi skribis,
oni eldonos aŭtune
kiel libron.

Mi ne sciis kion
diri al ŝi,
sed mi skribis,
ke ŝi nepre lasu tiri
putrajn dentojn al si
kaj singardu
pro francaj
donĵanoj.

Mi alfiksis ŝian foton
al la radioaparato
apud la ventolilo,
kaj ĝi moviĝis
kvazaŭ vivanta.

Mi sidis kaj rigardis ĝin,
ĝis kiam mi fumis miajn
lastajn 5 aŭ 6
cigaredojn.

Tiam mi ekstaris
kaj enlitiĝis.

La vivo de Borodin

La venontan fojon, se vi aŭdos Borodin,
pripensu, ke propre li estis kemiisto
kaj komponis nur por ripozi. Lia
domo ĉiam plenis de homoj -
studentoj, artistoj, drinkuloj, fabeluloj -
kaj li simple ne povis diri ne.
La venontan fojon, se vi aŭdos Borodin,
pensu pri tio, ke lia edzino uzis siajn
notopaĝojn por kovre elmeti ilin en katokorbojn
aŭ por kovri acidolaktajn pelvojn.
Ŝi suferis je astmo kaj sendormeco
kaj donis mole kuiritajn ovojn al li,
kaj se li volis rampi sub la litkovrilon
por fuĝi la endoman tumulton,
li rajtis kovri sin nur per la littuko.
Aldone plej ofte jam iu dormis
en lia lito.
Ili dormis dise, se ili
vere dormis iam,
kaj tial, ke kutime ĉiuj seĝoj estis okupitaj,
li dormis ofte sur la ŝtuparo,
envolviginte en olda ŝalo.
Ŝi diris al li, kiam li devas tondi la ungojn
al si, li ne rajtis kanti, ne fajfi, ne meti
tro da citrono en la teon aŭ elpremi per
kulero citronon.
Symphonie Nr.2 en h-moll
Princo Igor
Steposkizoj el Mez-Azio.
Li povis dormi nur, se li metis nigran tukon
sur la okulojn.

En 1887 li iris al balo
de la Medicina Akademio,
li surhavis kolorriĉan tradician nacian veston,
finfine li foje ŝajne vere ĝojis,
kaj kiam li falis planken, ĉiuj pensis,
ke li faras ŝercon.
La venontan fojon, se vi aŭdos Borodin,
pripensu tion.

Genia homo

Hodiaŭ mi konatiĝis trajne
genian knabon.
Li havis ĉirkaŭ ses jarojn,
sidis rekte apud mi,
kaj kiam la trajno laŭveturis
la bordon,
oni vidis la maron
kaj ni rigardis ambaŭ
el la fenestro
kaj observis la maron
kaj tiam li turnis sin
al mi
kaj diris :
"Ĝi 'stas ne bela."
Jen mi komencis
rimarki tion
je la unua fojo.

Herbo

Mi staras fenestre kaj
observas viron,
kiu tondas la gazonon
la bruoj tak-takanta
ensturmas, furiozas kiel
muŝoj kaj abeloj
super la tapeton,
estas tiel varmiga
fajro, pli bone ol steko,
kaj la herbo sufiĉe verdas
kaj la suno estas sufiĉe da suno,
kaj la resto de mia vivo
staras ĉi tie,
rigardante la verdajn erojn
kiuj flugas flanken -
sento, kvazaŭ la lastaj zorgoj
estus derazataj
aŭ oni stumblus foren,
por fari nenion plu por ĉiam.

Subite mi komprenas
oldajn virojn en balancseĝoj,
vespertojn en grotoj de Colorado,
etajn laŭsojn, kiuj enrampas la okulojn
de mortaj birdoj.

Antaŭen-malantaŭen li moviĝas
laŭstrie per la benzin-
motoro. Ne estas malinterese.
La stratoj kuŝas sur la dorso,
ĝuas la printempon
kaj ridetas.

Konkurso

Estas tiel :

se vi vane turniĝas surloke
kiel gramofono
(ĉu vi ankoraŭ memoras pri ili ?)

kaj veturas al downtown
kaj observas la knabojn enringe
kaj la grandajn blondinojn, kiuj
nun sidas ĉe aliaj.

Kaj vi oldiĝis kiel pugnoheroo
en filmo :

cigaron en la buŝo, bierventron,
sed havante eĉ ne cendon da mono,
nenian bonkonducon, lerninte nenion el ĉio,
kaj la plej multaj boksbataloj aĉas
kiel kutime,

kaj poste

sur la parkplaco

vi sidas tie, postrigardas ilin,
bruligas la cigaredon lastan por vi,
startigas la oldmabilon, veturas,
ne plu tiom juna, en via olda aŭto,
surstrate, haltas je ruĝa lucerno,
kvazaŭ tempo tute ne plu estus problemo
kaj jen ili venas laŭflanke :

junaj, plenigante tutan aŭtomobilon,
ridante,

kaj vi postrigardas ilin,

ĝis kiam iu post vi

premas la hupon

kaj fulmrapide

klarigas al vi, kiel malmulte
ankoraŭ restas de via vivo.

Mizeraj plendoj, memkompato.
Via piedo tuttretas la gaspedalon,
vi atingas la junulojn,
vi preterflugas ilin,
vi kaptas la stirradon, kvazaŭ estus la lasta amo,
kaj vi entreprenas vetkonkurson kun ili
al la strando,
vi mansvingas furioze kun via cigaro,
kun la klaktranĉilo,
ridante,
vi kunprenos ilin oĉeanen,
al la lasta marniksino,
al fuko kaj ŝarkoj kaj balenoj,
al la fino de karno kaj tempo kaj hororo ;
sed tiam ili haltas,
kaj vi veturas plu,
renkonte al via oĉeano,
la cigaro brulvundas viajn lipojn, tiel,
kiel pli frue iam la amo.

Poemo por Dante

Dante, Baby, la infero
estas ĉi tie kaj nun.
Mi dezirus, vi povus
vidi ĝin. Dum kelke
da tempo ni havis
la potencon
eksplozigi la mondon
kaj nun ni eltrovas
la eblon forlasi ĝin,
sed la plej multaj
devos resti ĉi tie
kaj morti. Aŭ per la bombo
aŭ per la mortulmontoj
aŭ per tio, kio aldone
estas forŝutata -
feko kaj vitro kaj fulgo.
Dante, Baby, la infero
estas ĉi tie kaj nun.
Kaj la homoj ankoraŭ
rigardas rozojn, veturas
biciklon, premas kontrol-
horloĝojn, aĉetas domojn
kaj pentraĵojn, aŭtojn,
ili ankaŭ venonte
kopulacios, ĉie,
kaj la pli junaj
ĉirkaŭrigardas kaj
krias por pli bona
mondo, kiel la junuloj

Ĉiam faris - kaj poste
ili iĝis oldaj kaj
partoprenis la
saman fekludon.

Tamen intertempe la
teruraj krimoj de la
jarcentoj alkreskis
je ŝarĝo, kiujn ni
povos forigi neniam.
Kelkaj ankoraŭ provas ĝin.
Ni nomas ilin sanktuloj,
poetoj, frenezuloj, stranguloj.
Dante, Baby, o Dante, Baby,
vi devus vidi nin hodiaŭ.

Krucifikso en mortulmano

Ja tie transe, mi kredas, ke ili komencas,
la montoj, blujaj kiel tolaĵamelo, tie
post la plorsalikoj ili larĝigas sin,
kvazaŭ ili volus platlaminati pumojn kaj
nektarinojn. Tiuj ĉi montoj - iel ili
aspektas por mi kiel olda virino kun
malbona memorkapablo kaj aĉetkorbo.
Ni estas ĉi tie en baseno. Tiel ĉiukaze
oni devas imagi tion. Ni sube estas en
la sablo kaj en la etaj stratoj ; la
lando estas platstamfita, eldragita, dividita ;
kaj stringata kiel krucifikso en mortulmano.
Ĉi tiu lando : aĉetita, vendita, reaĉetita
kaj denove vendita ; la militoj de longe
pasis, la hispanoj retirigis, reen al
sia ridinde eta fingringo Hispanio.
Parcelkomercistoj, kontruaj entreprenistoj,
parcelposedantoj interpugnas nun pro ĝi.
Ĉi tio estas la lando ilia, kaj mi iras
sur ĝi, mi vivas sur ĝi, dum iom da tempo,
ĉi tie rande de Hollywood, kie mi vidas
en ĉambrojn kun junaj viroj, kiuj aŭskultas
poluritajn sondiskojn, kie mi
pensas pri oldaj viroj, al kiuj muziko
donas nenion plu, al kiuj oni mizerigis
ĉion, kaj la morto, mi pensas, estas kelkfoje
tiel intencita kiel sinmurdo, kaj
se oni volas trovi la landon, oni iru
plej prefere al la Grand Central Market
kaj rigardu la oldajn meksikaninojn,
la povrecon...
Mi certas, vi vidis antaŭ multaj jaroj
la virinojn samajn, iliajn kverelojn
kun la samaj japanaj vendistoj, kiuj
langolerte, rutine kaj oroflave faras

sian brilan negocon kun oranĝoj, pomoj, avokadoj, tomatoj, salatkukumoj -, kaj kiel tiuj aspektas vi ja scias : ili tiel bone aspektas, kvazaŭ oni povus manĝi ĉiujn kaj poste fumi cigaredon kaj forgesi en la blua nuboj la aĉan mondon.

Tiam oni reiru plej prefere al la drinkejoj, la samaj drinkejoj, lignotegataj, tristaj, senkompataj, verdaj de policistoj, kiuj inter la tabloj trairas, rezolute rigardas kaj timas ; la biero ankoraŭ nun aĉas, ĝi jam gustas je kabano kaj disfalo.

Kaj necesas ne malmulte, por majstri tiun guston, kaj la povrecon, kaj sin mem.

Kaj havante la papersakon por aĉetoj inter la piedoj, kiu kontente staras kun avokadoj kaj oranĝoj kaj freŝaj fiŝoj kaj vinboteloj, kiu tiam pensas pri la vintro en Fort Lauderdale ? Antaŭ 25 jaroj estis ĉi tie putino, kiu blindis sur okulo, senmezure grasa, ŝi faris malgrandajn arĝentajn sonorilojn el la staniolpapiroj de cigaredskatoloj. Ankaŭ la suno tiam varmigis pli bone, kvankam tio verŝajne estas nur imago,

kaj vi prenas vian aĉetsaketon
kaj eliras, tiam iras sur la strato,
kaj la verda biero pendas rekte sur via stomako
kiel kurta mizera ŝalo, kaj vi turnas vin kaj
vidas nenie plu
oldajn virojn.

Alia akademio

Kiel ili povas vivi plu ? Oni vidas sidi ilin
en oldaj domeniroj
kun grasaj makulitaj ĉapeloj
en dikaj vestoj,
sen hejmo.

Kun pendantaj kapoj, la brakojn sur la
genuoj, ili atendas.

Aŭ ili staras antaŭ la misio,
sepcent viroj, paciencaj kiel bovoj,
kaj atendas, ke oni enlasu en la preĝejon ilin
kie ili sidante dormos
sur duraj benkoj, la unuaj al la aliaj
apogante sin, ronkante
kaj songante :
viroj
sen ĉio.

En New York City
kie iĝas pli fride.

Kaj ili eĉ ne kontraŭ
siaj samsortanoj sekuras, tiuj ĉi viroj
ofte rampas sub la aŭtoradiatorojn,
trinkas la kontraŭfrostan likvaĵon,
varmigas sin, estas dankemaj, por kelkaj
minutoj. Tiam ili mortas.

Sed tio estas pli antikva
kulturo, kaj kulturo,
kiu antaŭas nin.

Ĉi tie ili gratas sin
kaj atendas
dume en la Sunset Boulevard
la Hippies kaj Yippies
en 50-dolarbotoj
elmontras la dikfingron.

Ekstere antaŭ la misio mi aŭdis,
kion diris iu al sia apudulo :
"John Wayne ricevis ĝin."

"Kion li ricevis" diris alia
kaj ĵetis reston de la memfarita
sur la straton.

Tiu respondo
vere impresis min.

ĝin = la "Academy Award" ("Oscar").

Tumulto

La kaŭzo por la tumulto estis, ke ni ĉiam
ricevis fabojn kiel manĝaĉon,
kaj unu el la gardistoj kaptis nigran
junulon, kiu ŝetis planken sian teleron
kaj iu premis butonon
kaj subite ĉiuj draŝis reciproke ; mi fulme
frapis mian plej bonan amikon post la "antenojn",
iu verŝis al mi torenton da kafo
en la vizaĝon (kial ne, trinkebla ĝi ja ne estis)
kaj kiam mi elvenis en la prizonkorton,
la kugloj jam siblis
kaj ĉiu fripono ŝajne havis tranĉilon
nur ne mi
restis por mi nur preĝi kaj kuri
sed unue mi ne havis rilaton al dio,
kaj due mi jam tro grasis pro la poker-
ludoj kun mia kamarado en la ĉelo,
kaj tiam la voĉo de la direktoro eksonis
tra la laŭtparoliloj,
kaj pli poste mi aŭdis, ke la kuiristo
eluzis la pelmelon por rabi de maristo
la virgecon ;
mia razosapo estis malaperinta, kaj skatolo
da cigaredoj kaj eldono de la New Yorker
krome oni pafmortigis tri virojn
ses ricevis tranĉilpikojn
35 venis en la karceron
ĉiujn privilegiojn oni nuligis
la fermistoj tiel flamiĝeme nervozis
kiel librotenistoj en Los Angeles,
la prizonradio estis malŝaltita,

regis tombeĉa trankvilo,
vizitantoj ne rajtas enveni,
nur la poŝtaĵoj trairis plu
kaj sekvatage mi ricevis
leteron el St. Louis :
Kara Charles, mi kompatas vin, ke vi sidas
en la prizono, sed vi ja ne rajtas rompi
la leĝon.
La letero odoris je parfumo, platpremita
dianto enestis, aludoj pri libero, pri kisoj
kaj delikataj kalsonoj,
pri ridado kaj biero ;
kaj por la vespermangŝo
ili pelis nin denove egalpaŝe malsupren
al la faboj.

La grandulo kun la sabro

Atentu, mi iris al la frizisto, estis bela vetero, ĉio bonegis, ĝis kiam ili draŝis tiun klaron sur mian kapon... mi volis diri, mi sidis tie kaj atendis mian vicon kaj prenis fotografeton - la kutiman : inoj kun elpendantaj mamoj ktp., kaj tiam mi turnis la paĝon kaj jen estis kelkaj fotoj de orientuloj ie sub la libera ĉielo, kaj jen staris ĉi granda fektipo kun la sabro - sub la foton ili skribis, ke li tranĉbatas tre lerte, multe da forto en la batoj, kaj la foto lin montris ĝuste levanta la sabron, kaj oni vidis orientulon, li surgenuis tie kun fermitaj okuloj, poste - ZIP ! - kaj li surgenuis plu, sed sen kapo, kaj oni vidis la nukon ekzakte trahakitan, eĉ ne sango elŝprucis, tiel fulmrapide la disigo okazis, kaj tiam pliaj fotoj de senkapigoj, kaj tiam foto, kie ĉiuj ĉi kapoj kuŝis sur la gazono, sen korpoj, kaj la suno surradiis kaj la kapoj preskaŭ aspektis ankoraŭ vivantaj, kvazaŭ ili ne jam akceptis la morton - kaj tiam la frizisto diris :

La sekvanta !

Kaj mi iris al la seĝo kaj mia kapo ankoraŭ surestis.

Kaj lia kapo diris al mia kapo :

kiel vi do deziras ĝin?

kaj mi diris, nu iel meze...

kaj li ŝajnis tute afabla kaj prudenta homo

kaj iel estis bona sento kuni kun afabla prudenta homo.

Kaj propre mi volis demandi pri tiuj kapoj,

sed mi diris al mi, eble tio ŝokus

aŭ eble eĉ kondukus je tre stultaj pensoj lin

aŭ li simple dirus ion, kio ne helpus nin.

Sekve mi diris nenion.

Mi aŭskultis lin, dum li frizis miajn harojn

kaj li komencis paroli pri sia bebo

kaj mi provis koncentriĝi pri lia bebo,

liaj diroj ŝajnis tre normalaj kaj logikaj

kaj spite tion mi devis pensi pri tiuj

kapoj.

Fininte la frizadon,
li turnis min, por ke mi povu vidi la spegulon.
Mia kapo ankoraŭ surestis.

Estas bone, mi diris al li, kaj mi ekstaris, pagis kaj
donis ampleksan krommonon.

Mi eliris kaj virino preteriris kaj surhavis sian kapon
kaj la homoj preterveturantaj en aŭtoj same surhavis
siajn kapojn.

Mi devintus koncentriĝi pri la mamoj, mi pensis,
tio multe pli bonas, ĉiuj ĉi elpendantaj objektoj, aŭ
la grandaj "truoj", la magiaj superbelaĵoj gamboj,
SEX,

estas ja tamen grandioza afero, sed la tago estis
fuŝita por mi. En ĉiu kazo mi devos dormi nokton,
por povi liberiĝi de la kapoj.

Esti homo
estas komplika afero : okazas tiom multe...

Mi vidis mian kapon en montrofenestro
mi vidis mian spegulbildon
kaj mia kapo havis cigaredon antaŭe
mia kapo aspektis laca kaj trista
ĝi ne ridetis kun sia nova frizo.

Tiam ĝi malaperis
kaj mi iris plu
preter domoj plenaj de mebloj kaj katoj kaj
hundoj kaj homoj,
kiuj kiel mi ankoraŭfoje havis feliĉon,
kaj mi forĵetis la cigaredon,
vidis bruli ĝin sur la asfalto,
ruĝe kaj blanke, kun fajna fumkolono,
kaj la suno brilis
kaj tio agrablis.

Mia amiko William

Mia amiko William
estas feliĉa homo, li ne povas
imagi suferi iam,
li ankoraŭ havas la unuan laboron,
la unuan edzinon,
kaj li povas veturi aŭton sen riparo
dum 50 000 mejloj.

Li dancas kiel cigno
kaj havas la plej belajn
kaj senesprimajn okulojn
okcidente de El Paso.

Lia ĝardeno estas paradizo
liaj gladfaloj tranĉile akras
lia manpremo fortikas.

La homoj amas lin.

Se mia amiko William mortos iam
tiukaze certe ne pro frenezo
aŭ kancero. Li rekte pasos
preter la diablo
ĉielen.

Vi povas vidi lin hodiaŭ vespere
en la amika rondo, kiel li rikanas
super sia Martini, beata
kaj ravita, dum iu alia ulo
banĉambre lian edzinon
fikas.

Nu, kie brulas, ĝentlemanoj ?

La servoj fiis
kaj la hotelbubo ĉiam denove en la falsa
momento alvenis kun mantukoj.
Ebrie, kiel mi estis, mi elsvingis finfine
pugnon al lia kranio.
Li estis knabeto kaj falis
kiel folio en oktobro,
absolute sata ;
kaj kiam la polipoj suprenvenis,
mi jam ŝovis sofon antaŭ la pordon
kaj riglis perĉene,
mi lasis ludi la Duan frazon el la Unua simfonio
de Brahms kaj havis manon en la postaĵo de ino,
kiu sufiĉe oldis por esti mia avino ;
kaj ili enbatis la pordon
forŝovis la sofon,
la fikdamo kriĉis, mi vangofrapis ŝin,
min turnis kaj demandis :
Nu, kie brulas, ĝentlemanoj ?
kaj tia juna ulo, kiu ne razis sin
ĝis tiu tago, draŝis al mi klabon sur la kapon
kaj sekvamaten mi kuŝis en la malsanula sekcio
de l' prizonaĉo
katenite je mia lito.
Varmegis,
la ŝvito gutis tra la blanka
sensenca toltuko,
ili metis multajn idiotajn demandojn al mi ;
kaj mi sciis, ke mi malfruigos pri l' laboro ;
kio ege cerbumigis min.

Denove tia kritikanto

Yeah, li diris, mi scias kiel vi faras tion
rilate al viaj poemoj : "Mi deŝiris ŝiajn
kalsonetojn malsupren kaj per ununura puŝo
mi ramis la grandan ĝis supren
en la cerbon."

Ha, ha, mi diris.

Jes, jes, li diris, mi scias la aferon, kiel
iras pri viaj poemoj : "Ne plaĉis lia vizaĝo
al mi, kaj tial mi larĝbatis per botelo je
kaĉo ĝin, kaj tiam mi malsuprenŝiris la
ĉemizon de li kaj viŝis per ĝi la plankon."

Ha, ha, mi diris.

Yeah, li diris, mi scias precize,
kiel vi faras ĝin : "Mi..."

Nu ? mi demandis.

Nu jes. Vi ja scias, kion mi celas.

Li ekstaris kaj foriris. Mi ekstaris
kaj ŝetis liajn vakajn bierujojn
en la rubobarelon.

Babilaĉulo

La junulo trote stamfas per siaj
kotaj piedoj sur mia animo,
parolas pri koncertoj, virtuozoj, direktistoj,
pri malpli konataj romanoj de Dostojewski,
rakontas pri tio, kiel foje li instruis kelnerinon,
avancitan melkistinon, kiu ne sciis, ke en francan
salatsaŭcon oni devas enmeti tion kaj tion ; li
elsputas prijuĝojn pri la belaj artoj,
ĝis kiam mi hatas la la belajn artojn
kaj vidas jam nur unu akcepteblan solvon :
reiri al la plej proksima drinkejo, reen al
la vetkurejo kaj observi la ĉevalojn,
reen al la aĵoj, kiuj kuras per si mem,
sen tiu bombasta elsputado de vortoj, sen
tiu senfina galimatio, sen tiu eta buŝo,
kiu babilaĉas kaj babilaĉas ;
junulo, ankoraŭ infano, malsana pro tiom da arto,
li alkroĉiĝas la arton kiel je antaŭtuko de
patrino, kaj mi demandas min, kiom da dekmiloj
en la lando estas prezice kiel li
en pluvemaj noktoj
en sunplenaj matenoj
en vesperoj, en kiuj oni ŝatus trankvilon
en koncerthaloj
en kafejoj
en poetarangoj
ĉi fuŝuloj kun siaj babilaĉo kaj babilado.

Estas tiel, kvazaŭ porko
eniras liton kun bona virino,
kiun poste neniu volas havi plu.

La violonisto

Li sidis sur la tribuno tute supre
ĉe la flanko
kie post la lasta vojkurbo
sur la rekta distanco ili batalas
por la cellokoj.

Li estis malgranda homo,
rozeca koloro, kalva, dika,
pli ol sesdek.
Li ludis violonon,
li ludis klasikan muzikon
per violono
kaj la ĉevalmaniuloj ignoris lin.

BANKER AGENT venkis en la unua vetkuro
kaj li ludis sur la violono.
CAN FLY venkis en la tria vetkuro, kaj
li ludis plu per sia violono.

Mi iris por alporti kafon,
kaj kiam mi revenis, li ankoraŭ ludis,
kaj li ankoraŭ ludis
kiam BOOMERANG en la kvara estis venkinta.

Neniu stopis lin
neniu demandis lin, kion li faras tie,
neniu aplaudis.

Post la venko de PAWEE en la kvina
li ludis plu. La tonoj
falas super la randon de la tribuno
en la venton kaj la sunon.

STARS AND STRIPES venkis en la sesa
kaj li ludis plu.

STAUNCH HOPE antaŭenpuŝiĝis
interneflanke kaj decidis

la sepan por si, kaj la violonisto
svingis la arĉon, kaj kiam

LUCKY MIKE, privetita je 4:5
en la oka venkis, li ankoraŭ faris
muzikon.

Tiam venkis DUMPTY'S GODDESS

en la lasta vetkuro, ili lante
retiriĝis sur la longan vojon

al la aŭtoj, venkitaj, je plia

fojo bankrotaj, kaj la violonisto
postsendis al ili siajn melodiojn.

Mi sidis kaj aŭskultis lin.

Ni nun tute solis tie supre,

kaj kiam li finis,

mi aplaŭdis.

Li ekstaris, rigardis min

kaj kliniĝis riverence. Tiam li

metis sian violonon en la keston,

rektiĝis kaj descendis la

ŝtuparon.

Mi ankoraŭ atendis kelkajn minutojn,

tiam ekstaris kaj lante retiriĝis

sur la longan vojon al mia aŭto.

La vespero komencontis.

Morta cigno

Cignoj mortas
ankaŭ printempe
kaj tiu tie naĝis
morta sur la flanko
je dimanĉo
drivis kun la fluo
en cirklo
kaj mi iris
al la rotondo, kaj super mi
cirklis dioj en batal-
veturiloj, hundoj,
virinoj
kaj la morto
hastis
kiel muso
en mian kolon
kaj mi aŭdis
alveni ilin kun
siaj piknikkorboj,
kun sia ridado
kaj mi rigardis
la cignon
kaj sentis kulpa min,
kvazaŭ la morto estus io,
por kio oni devas honti
kaj en mia stulteco
mi foriris kaj
lasis al ili
mian mirinde belan
cignon.

La floramanto

En la Valkirio-montoj
inter stilzantaj pavoj
mi malkovris floron,
kiu tiom grandis kiel
mia kapo
kiam mi kliniĝis
por flari ĝin
mi perdis orelan lobon
pecon de mia nazo
okulon
kaj duonan skatolon
da cigaredoj.

Mi reiris
sekvatage
kaj volis
dehaki
la malbenitan aĵon
sed mi trovis ĝin
tiel bela, ke mi
murdis anstataŭ ĝi
pavon.

Lokon por la stratbuboj !

La knaboj moviĝis al supre,
la knaboj grimpas
laŭ telegrafaj fostoĵ alten,
la boĵlero gargaras
hispane,
la knaboj grimpas
laŭ telegrafaj fostoĵ alten -

Por tio batalis Karlo la Granda,
por tio ili ŝiris la faŝiston Duce
el la aŭto,
tiris lian felon super
liajn orelojn kaj pendigis lin
per la piedoj al supre -

La knaboj grimpas
laŭ la griza fosto alten,
estas tri aŭ kvar ;
ni ĝuste ekloĝis
ĉi tie,
la bildoj ne jam
estas elpakitaj,
la leteroj el Anglio
el Chikago kaj Cheyenne
kaj New Orleans,
sed la biero
staras sur la tablo,
kaj apude kuŝas 5 oranĝoj

kaj 4 piroj, la vivo ĉi tie
ekas do ne tro malbone,
se oni flankelasas
la 15 dolarojn,
kiujn enkasigis iu
antaŭ ol li funkciigis la gason ;
la knaboj nun supras
kaj saltas sur la bluverdajn
garaĝotegmentojn,
mi staras nuda
post la kurteno,
fumas cigaredon.
kaj estas nekredeble impresata,
kvazaŭ mi vidus danci
jen ekstere
la Virgulinon Maria ;
kaj tra la fenestro alnorde
mi povas vidi du virojn,
kiuj manĝigas 45 kolombojn,
kaj la kolomboj
palpe paŝas kaj pikas
cirkle,
ĉiam 8 aŭ 10 el ili
kiel je nevideblaj
ŝnuroj,
kaj estas je la tria,
posttagmeze,
kaj la cigaredo
bongustas.

Por tio batalis Cicero,
Jake La Motta kaj
Waslaw Nijinsky ;
sed mi jam de du semajnoj
ne plu glutis
miajn vitamintablojdojn
kaj krome iu forfingris
nian gitaron.
La knaboj zigzage kuras
sur la bluverdaj tegmentoj,

norde la kolomboj
suprenflirtas,
ĉio tiele sanktas,
ke oni preskaŭ emas malesperi,
kaj mi blovas senvorte
la bluan fumon for de mi.
Tiam aperas virino
en ruĝa mantelo,
videble instruistino,
kiu havas la potencvorton ĉi tie.
kaj ne volas lasi
al la knaboj
la lokon en la suno -

Hej ! VI !
Malsupren de tie !
Tuj !

Mirinda vido :
kiel cervoj fuĝante
la ĉasiston.

Por tio batalis Agrippina,
eĉ Mithridates,
eĉ William Hazlitt.

Kaj al mi nun restas
nur tio :
elpaki.

Cowboy de la apokalipso

Morti en la botoj
dum oni skribas
lastan poemon, ne
tiel gloriĉas
kiel rajdi
alte sur la ĉevalo
Broadway-e
kun stango da dinamito
inter la dentoj,
sed ankaŭ la tuto de la planedoj,
determinitaj kaj prinitaj de l' homo,
ne multe pli edifas, kaj la ĉevalo
grizeblankis, la viro nomiĝis
Sanchez aŭ Kandinsky, la temperaturo
estis 25 gradoj enombre
kaj la buboj postkuris lin
kaj kriis : Hog, Hog,
ni estas satas ĝisgorg'e,
blovu nin ĉielen !

La blankulaj verkistoj

La blankulaj verkistoj frapas kutime
jam frue matene, frapas kaj sonorilas
seninterrompe, kvankam ankoraŭ ĉiuj
ĵaluzioj antaŭfenestras.

Kun naŭzosento mi fine ellitiĝas
kaj diras al mi : Tia obstino
devas signifi ion bonan
eble premion
aŭ virinon...

"Ja bonas ! Ja bonas ! " mi vokas
kaj ĉirkaŭvidas pro io, per kio
mi povas kovri mian malbelan nudan korpon.
Fojefoje unue mi devas subigi vomosenton,
poste gargari, kaj de la gargaroj mi tiom
pli vomemas. Mi do tuj tute lasas de tio
kaj iras al la pordo :

"Hallo ?"

"Ĉu vi estas Bukowski ?"

"Yeah, envenu."

Ni sidas kaj rigardas nin.

Li, tre vitala kaj juna,
vestis sin laŭ la plej nova modo,
amaso da silko, en ĉiuj koloroj,
vizaĝo kiel neĝmustelo -

"Ĉu vi ne rememoras pri mi?"

"NE."

"Mi jam foje estis ĉi tie. Vi ne diris
multon. Miaj poemoj ne plaĉis vin."

"Ekzistas sufiĉe da kialoj
por trovi poemojn malbonaj."

"Provu foje kun tiuj."

Li enmanigas ilin al mi.

Ili pli platis ol la papero,
sur kiu ili estis tajpitaj. Jen absolute
nenio moviĝis, totala kalmo. Mi ĝis tiam
neniam legis ion tiel magran.

"Ah", mi diris, "a-ah".

"Ĉu tio signifas, ke ili NE plaĉu al vi?"

"Jen nenio troveblas, ili estas kiel urinpoto,
el kiu la piso forvaporis."

Li prenis la tekstojn al si,
ekstaris tien kaj reen marŝis. "Atentu,
Bukowski, mi povas prizorgi kelkajn flirtinojn
el Malibu al vi. Flirtinojn tiajn, kiajn vi
neniam vidis ĝis nun!"

Kaj li forkuris tra la pordo.

Liaj flirtinoj el Malibu estis
kiel liaj poemoj :

Mi neniam akceptis ilin.

Intervjuoj

Junaj knaboj de la Underground-gazetoj kaj de pli malgrandaj gazetoj venas nun pli ofte kaj pli ofte al mi kaj intencas fari intervjuon. Ili havas longan hararon, ĉiuj estas sveltaj kaj kunprenas sonbendojn kaj amason da biero. La plej multaj el ili sukcesas resti ĉi tie kelkajn horojn kaj trinki ĝis ebrio.

Se ĝuste iu el miaj amikinoj ĉeestas, mi transdonas la vorton al ŝi. Eku do, mi diras, diru la veron pri mi.

Kaj tiam ŝi diras, kion ŜI opinias la vero.
Kutime mi estas raportata idioto kio efektive veras.
Poste oni demandas min :

Kial vi ne skribis foje dum dek jaroj ?

Mi ne povas diri.

Kial oni neniam enigis en la armeon vin ?

Tegmenta difekto.

Ĉu vi regas la germanan ?

Ne.

Kiuj estas viaj plej ŝatataj aŭtoroj ?

Mi ne scias.

**La intervjuojn mi vidas malofte. Unu el
tiuj knaboj skribis al mi,
ke mia amikino kisis lin,
dum mi entualetis.**

**Jen vi bone elvenis,
mi reskribis.**

**Kaj cetere : Forgesu tiun
fekon, kiun mi diris pri
Dos Passos.**

**Aŭ ĉu estis Mailer ?
Estas tre varme hodiaŭ vespere,
la duona najbaro ebrias.
Kaj la alia duono mortas.**

**Se mi al iu, kio koncernas la skribadon,
rajtas doni konsilon, jen tiu :
Lasu ĝin.**

Mi nun liverigos rostitan kokleton al mi.

Buk

Por friponoj, monaĥinoj,
oficistoj kaj vi...

Ni havas ĉion kaj ni havas nenion
kaj kelkaj viroj faras en la preĝejo
kaj kelkaj faras per tio, ke ili dis-
ŝiras papiliojn en la mezo
kaj kelkaj viroj faras en Palm Springs
kun blondinoj, kiuj havas Cadillac-animojn.
Cadillac-ojn kaj papiliojn
nenion kaj ĉion
dum la vizaĝo ŝrumpas
ĝis la lasta fibro
en kelo en la korpo de Kristo.
Estas io por friponoj, monaĥinoj,
oficistoj kaj vi...
io je la oka matene
io en la biblioteko
io en la rivero.
Ĉio kaj nenio.
En la buĉfabriko ĝi alvenas
je hoko laŭplafone
vi krude ŝiras malsupren ĝin
unu

du

tri

kaj tiam vi havas sur via nuko
por ducent dolaroj mortan viandon,
ties ostojn sur viaj ostoj -
vi havas ion, kaj vi havas nenion.
Ĉiam estas sufiĉe frue por morti
kaj ĉiam tro malfrue. La bovovango,
kiu ŝaŭmante ŝprucas en la trogon
blanke kahelitan, diras nenion al vi,
ankaŭ la tombofosistoj, kiuj pasigas
la tempon ĉirkaŭ la kvina matene

per kafotrinkado kaj pokero ĝis la
frosto degelas de la herbotigoj,
ne havas ion por diri al vi.

Ni havas ĉion kaj ni havas nenion.
Vitroduraj akre-eĝaj tagoj kun la
neeltenebla fetoro de riverŝlimo,
pli fia ol feko ;
ŝaktagoj kun ĝojmankaj movoj kaj
kontraŭmovoj kaj tiel malmulte da senco en ĉio,
ke venko samtiel seninteresas kiel perdo ;
tagoj lantaj kiel azenoj, kiuj eluzitaj kaj
grumble turmentas sin sub la ardanta suno
sur strato, kie frenezulo sidas kaj atendas
inter ruĝgorguloj kaj birdreĝoj, griza kaj
elsuĉita kiel muŝo en la reto.

Ankaŭ bonaj tagoj kun vino kaj kriado, kun
pugnobataloj en stratetoj, kun inoj, kiuj
volvas ĝeme siajn dikajn krurojn ĉirkaŭ
viajn koksojn ; tagoj, en kiuj reklamŝildoj en la
taŭroareno ekbrilas kiel diamantoj kaj tondre krias :
"Mother Capree !" ; tagoj, en kiuj violoj elkreskas
el la tero kaj diras al vi : Forgesu la mortajn
armeojn kaj la pasintajn amatinojn, kiuj suĉis
vian monon. Tagoj, kiam infanoj diras gajajn kaj
brilajn vortojn, kiel sovaĝuloj, kiuj intencas sendi
informon per siaj korpoj al vi, tiel longe, kiel ili
ankoraŭ sufiĉe vivecas por senti ion, por povi el-
radii ion, infanoj, kiuj petolas sen iu penso pri
malpermesoj kaj salajroj kaj idealoj kaj posedo
kaj etcerbaj konceptoj.
Tagoj, en kiuj vi povas larmi de mateno ĝis vespero
en verda ĉambro post fermita pordo ; tagoj, se vi
povas ridi pri la bakisto, ĉar li havas tiajn
longajn krurojn ; tagoj kiam vi alĝapas nur vandon...

Kaj nenion kaj nenion. La tagoj de la ĉefoj,
malkuraĝaj figuroj kun buŝfeto kaj grandaj piedoj ;
viroj, kiuj aspektas kiel ranoj, kiel hienoj kaj iras

tiel kvazaŭ ritmo neniam ekzistis, viroj, kiuj trovas
inteligente ĝin dungi kaj elĵeti virojn kaj fari
profiton ; viroj, kiuj posedas multekostajn edzinojn
kiel 60 terakrojn per borstangoj truitajn, virinojn, kiujn ili
paradigas antaŭ aŭ forĉasas de malpli fortaj ;
viroj, kiuj povas murdi vin, ĉar ili frenezas kaj la
leĝon havas je sia flanko, viroj, starantaj antaŭ
fenestroj dek metrojn larĝaj, kaj tamen ne vidantaj,
viroj, kiuj per luksaj jaĥtoj povas rondveli la mondon,
sen tio, ke ilia horizonto larĝiĝas eĉ nur je milimetro ;
viroj kiel limakoj, kiel angiloj, viroj kiel
vermoj en lardo kaj eĉ ne tiel impresaj...

Kaj nenion. Vi ricevas vian lastan salajron
en haveno, en fabriko, en sanatorio, en hangaro,
en spektaklejo, aŭ en frizosalono aŭ por iu
alia laboro, kiun vi jam sen tio ne aspiris.
Vi pagas per impostŝarĝoj, per malsanoj kaj
humiliĝoj, per rompitaĵoj brakoj kaj truoj en
la kapo, la tuta interno elvenas, kiel ĉe olda
kuseno.

Ni havas ĉion, kaj ni havas nenion.
Kelkaj dum certa tempo sufiĉe bone marŝas,
poste ili rezignas. La sukceso kaputigas ilin,
aŭ la naŭzo, la aĝo, nesufiĉe mankhava sinnutro,
inko en la okuloj aŭ infanoj en College,
nova aŭto, rompita spino pro la skiado en Svisio,
nova edzino, radikala ŝanĝo en la firmo, aŭ simple
normala eluziĝo kaj disfalo. La viro, kiu ankoraŭ
hieraŭ tramarŝis la tutan distancon aŭ tradrinkis
tri tagojn kaj noktojn en la Sawtooth Mountains,
jam nur estas io sub kovrilo aŭ kruco aŭ ŝtono,
aŭ la ofero de oportuna iluzio, per biblio, per
golfvalizeto aŭ teko armite. Kiel rapide ili
sinkas ĝis nulo, ĉiuj ĉi viroj, de kiuj vi atendis
tion neniam...

Tagoj kiel ĉi tiu. Kiel via hodiaŭa tago.
Eble la pluvo frapas la fenestron kaj volas
traveni al vi. Kion vi vidas hodiaŭ ? Kie vi

estas ? La plej bonaj tagoj venas foje tuj komence, foje en la mezo kaj foje nur en la fino. La ruinparceloj jen ekstere ne malbonas, bildkartoj de preĝejoj en Eŭropo aŭ homoj en vaksfigura kabineto, enfrostigitaj je sia tuta sterileco. Terure, sed ne malbone. Pensu pri la kanonoj enparke, pri matenmanĝoj kun toasto kaj kafo, sufiĉe varmega, por ke vi rimarku, ke vi hayas ankoraŭ langon. Rigardu la tri geraniojn antaŭ la fenestro, kiuj penas ruĝe aspekti aŭ rozkoloro aŭ kiel geranioj.

Ne estas miraklo, ke virinoj fojefoje ploras, ne estas miraklo, ke muloj iam kaj tiam ne emas suprengrimpi la monton. Ĉu vi estas en hotel-ĉambro de Detroit kaj serĉas cigaredon ? Havi nur unu plian bonan tagon, almenaŭ aludon de ĝi ? Flegistinoj elvenas post sia servo el la konstruaĵo transe kaj ĝisgorgĉe satas, ok flegistinoj kun diversaj nomoj kaj loĝejoj, ili iras trans la gazeton, kelkaj celas gazeton aŭ kakaon, kelkaj deziras varman duŝon, kelkaj deziras viron, kelkaj apenaŭ povas pensi plu pri io. El ĉio sufiĉe kaj ne sufiĉe. Lacaj pilgrimantoj inter arkadoj, orangĉoj, stratkanaletoj, filikoj, anti-korpoj, vakaj Kleenex-skatoloj.

Fojefoje, se la suno volas fari plezuron al ni, ŝvebas facilaodoro de urnoj en la aero kaj la lada bruo de oldaj batalaviadiloj, kaj se vi eniras la domon kaj frote movas fingron sur la fenestrobreto, vi trovas polvon, eble eĉ teron. Kaj se vi elrigardas la fenestron, estas tie la tago, kaj se vi oldiĝos, vi staros kaj elvidos, vi suĉos iom la langon : Ah, ah... ne, ne... eble...

Je kelkaj tio aspektas tute natura, ĉe aliaj obscena. Estas ĉie la sama.

Palmfolioj en pluvo

Precize noktomeze,
en silvestro 1973 en Los Angeles komencis
pluvi sur la
palmfoliojn antaŭ
mia fenestro, la hupado
kaj pafado ekis, estis
infera tumulto.

Mi enlitiĝis
jam je la naŭa,
forŝaltis la lumon
kaj tiris la kovrilon
sur min...

Ilia petolemo, ilia
gajeco, ilia kriĉado,
iliaj paperĉapeloj,
iliaj aŭtoj, iliaj edzinoj,
iliaj amatorecaj
drinkrondoj...

En la silvestronokto
kaptas min
horora sento. La vivo,
mi pensas, ja ne estas
deŝirkalendaro.

Nun la hupado
ĉesiĝis. Neniu
piroteknikaĵoj plu,
ne plu tondro. Post kvin
minutoj ĉio finiĝis.
Ĉio, kion mi aŭdas,
estas pluvo sur palm-
foliojn, kaj mi diras al mi :
Mi neniam komprenos la homojn,
sed mi sukcesis vivi
kun ili.

Interparolado matene je la kvara

Matene je la kvara malfermiĝas
pordo, iu proksimiĝas sur nudaj
piedoj sur la koridoro, tiam frapas
porde, vi formetas la bieron
kaj malfermas.

"Nu, mi estu damnita", ŝi diras,
- ĉu vi eble neniam dormas, hm ?"

Ŝi envenas, la hararon en papilotoj,
vestite en silka matenrobo,
sur kiu leporetoj kaj birdoj petolas.

Ŝi kunportis markoviskion.

Vi ne lasas nomi avarulo vin
kaj aldonas du glasojn.

Mia viro, ŝi diras, estas en Florida,
kaj ŝia fratino sendas monon
kaj vestojn, kaj ŝi serĉas nun
jam dum 32 tagoj laboron.

Vi rakontas al ŝi, ke vi estas
agento por ĵokeo kaj skribas
krome ĵazaranĝojn kaj Love Songs,
kaj post kelkaj glasoj ŝi ne plu
penas tiri la matenrobon super la
femurojn, kiu ĉiam denove disfaldas
sin.

La gamboj ja ne estas malbelaj, por diri
la veron, estas eĉ tre belaj gamboj kaj
baldaŭ vi estas okupata pri tio kisi
kapon, kiu plenas de papilotoj, kaj la
leporetoj palpebrumas al vi, kaj Florida
tre foras, kaj ŝi diras, ke ja ne estas
tiel, kvazaŭ ni estus fremduloj, oni ja
jam vidis ĉeokaze en la domkoridoro,
kaj poste ne restas multe por diri.

Recesio

Virinoj kun sunfrapo
kaj sen viroj
je dimanĉo en
Santa Monica. La
viroj ĉiuj ie laboraĉas
aŭ enĉelas, kelkaj en-
sanatorias. Knabino
en skafandro
el nigra gumo
naĝas eksteren
kaj atendas ondon.
Domoj glitas de la
rifoj kaj malaperas maren.
La trinkejoj vakas, la
omaro-restoracioj vakas,
ni havas recesion,
oni diras,
la bonaj tempoj pasis.
Oni ne plu povas distingi
senlaborulon de artisto,
ili ĉiuj aspektas same,
kaj ankaŭ la virinoj
ĉiuj aspektas same,
nur eĉ iom pli
malesperiginte.
Ni haltas antaŭ Hippie-budo
supre en la Topanga Canyon,

ni eniras kaj atendas
la priservaron, ni
atendas kaj atendas...
En la tuta regiono, de la
kanjono ĝis la strando, oni
nervozas kaj sentas senutila sin,
kaj ĉi tie ili metis ŝildon
en la pordon :
"Liberaj ĉambroj. Kelnerino
serĉata." La kamenligno
ne brulas, la maro kotas,
la montetoj elsekiĝis,
la temploj ne havas
sonorilojn,
la amo ne liton.
Virinoj kun sunfrapo
kaj sen viroj.
Sola velboato.
Ĉia vivo
dronis.

462-0614

Mi ricevas nun multajn
telefonvokojn. Ili ĉiuj
samas. "Ĉu vi estas
Charles Bukowski ? Tiu,
kiu skribas ĉiujn ĉi
tekstojn ?"

"Jes", mi diras.

Ili diras al mi, ke ili
komprenas miajn tekstojn,
kaj kelkaj mem skribas
aŭ intencas skribi
kaj ili havas tristajn
terurajn laborojn
kaj telefonvokas min
ĉar ili tiuvespere ne plu
eltenas en sia loĝejo
en sia ĉambro
en siaj kvar vandoj -
ili volas paroli
al iu
kaj ili ne volas kompreni,
ke mi ne povas helpi al ili,
ke mi ne scias la vortojn
liberigajn. Ili ne povas
kompreni, ke mi nun ofte
en mia ĉambro surgenufalas
kaj prenas la manojn sur
mian ventron kaj ĝemas :
"Dio mia, ne jam denove !"

Ili ne povas kompreni,
ke la senanimaj homoj
la soleco
la strato
la vandoj
ankaŭ por mi
estas la samaj.
Kaj se mi finas la vokon,
ili pensas, ke mi
prisilentis mian sekreton.
Mi ne skribas, ĉar
mi scias ion pli bone.
Se la telefono vokas,
ankaŭ mi volonte
aŭdus vortojn, kiuj faras
pli facile kelkan.

Tial mia numero
enestas en la
telefonlibro.

ENHAVO

Mia patro	5
Vegas	6
Viro kaj virino enlite je la deka vespere	8
La duŝo	10
La predo	12
La momento de l' vero	14
La prizonaĉo de Moyamensing	15
Al la putino, kiu ŝtelis miajn poemojn	16
Maŝinpafiloj, gardoturoj kaj kontrolhorloĝoj	17
Faboj kun ajlo	20
Anonco en la Philadelphia Inquirer	21
Laboristoj	23
La fino de Seivers	26
La tretkaruselo	27
Amo	29
Ruĝa kaj ora koloro	30
Hemoroidoj-Blues	31
Fuĝo antaŭen	33
Dormanta virino	35
Por ino, kiun mi konis	36
Ja ne montru vin ĉi tie	37
Buffalo Bill	39

El papilio oni ne povas fari leonon	41
Eniro libera	43
Letero el granda foro	44
La vivo de Borodin	45
Genia homo	47
Herbo	48
Konkurso	49
Poemo por Dante	51
Krucifikso en mortulmano	53
Alia akademio	55
Tumulto	57
La grandulo kun la sabro	59
Mia amiko William	61
Nu, kie brulas, ĝentlemanoj?	62
Denove tia kritikanto	63
Babilaĉulo	64
La violonisto	65
Morta cigno	67
La floramanto	68
Lokon por la stratbuboj!	69
Cowboy de la apokalipso	72
La blankulaj verkistoj	73
Intervjuoj	75
Por friponoj, monaĥinoj, oficistoj kaj vi	77
Palmfolioj en pluvo	81
Interparolado matene je la kvara	82
Recesio	83
462-0614	85